

HORIZONTO

*KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO*

8-a Jaro N-ro 43 (1)
Januaro-Februaro 1983



KUN OPTIMISMO AL 1983

PROpono PRI ESPERANTO AL EŬROPA PARLAMENTO

UNIVERSITATAJ PRELEGOJ EN ESPERANTO

PADERBORN 1982: PLIA SUKCESO

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Redakta Komitato: Salvador Gumà, Ivo
Lapenna, Jean Thierry.

Adreso de la redakcio kaj administracio:
ELDONEJO PERSPEKTIVO, Nørregårds-
vej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kiu
prizorgas la distribuon de la artikoloj
kaj aliaj tekstoj al la respondecaj mem-
broj de la Redakta Komitato. La redak-
cio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon konforme
al la Fundamento de Esperanto.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la ELDONEJO PERSPEKTIVO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.
Postĉekkonto: Kopenhago 9 32 95 95.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Tiu abono ne inkluzivas
membreon de ICNEM. Vidu la antaŭlastan
kovrilpaĝon.

Por recenzo bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.
HORIZONTO akceptas ankaŭ anoncojn.

ENHAVO

Kun Optimismo Al 1983 (Ivo Lapenna)	1
Paderborn 1982: Plia Sukceso (P.U.)	4
El niaj Organizaĵoj	6
Amled (Peter Zacho)	7
Renkonte al 1987 (Ivo Lapenna)	8
Propono Pri Esperanto Al Eŭropa Parlamento La Kongresan Eldonon De "Heroldo", Kiu Permesis Kaj Kiu Financis? (Lis Thune).....	10
Pliaj Kritikaj Rimarkoj Pri La UK En Antverpeno	11
Universitataj Prelegoj En Esperanto (Reto Rossetti)	13
Jesper Neergaard	14
Graz - 9-a Internacia Konferenco de N.E.M. (Klaus Perko)	16
Esploro Kaj Dokumentado (Prof. D-ro Ivo Lapenna)	18
Irano: Persekutado De Bahaanoj Pludaŭras (H.D. Maas)	19
Libroj Sub La Lupeo (Salvador Gumà)	21
Lingva Angulo (I.L.)	23
Tra la Esperanto-Gazetaro (Jean Thierry)	25
Mallonge	27

Frontpaĝa bildo: Skulptaĵo de Jesper
Neergaard, kiu daŭre havas grandajn
sukcesojn kiel skulptisto (v. p. 14).

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz.
Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 228, Capworth Street,
London, E10 7HL. Pĉk. 37.507.9106.
Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Eldonejo Perspektivo, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre. Pĉk. 9 32 95 95.
Jarabono: 100 d.kr.

Francio:

Marie Thierry, 5 rue León Cogniet,
F-75017 Paris, Francio.
Jarabono: 80 ffr. Pĉk. 191707 Z Rennes.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Günne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85).
Jarabono: 33 DM.

Grekio:

Adda Sakellarpoulou, Sokratous 88, Omo-
nia, Ateno 101. Jarabono: 800 dr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, Banca Mas Sar-
da: 19000 669/2, Vilafranca del Pene-
des (Barcelono), Avenda de Barcelo-
na 35. Jarabono: 1300 pesetoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379, Petah Tikva. Pĉk.
Bank Hadoar, 4-45854-8.
Jarabono: 120 ŝekel.

Jugoslavio:

Prof. d-ro Oton Pancer, Voĉarsko Naselje 10,
YU-41000 Zagreb. Jarabono: 400 n. din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. Toronto Ont.
M4S 2V2. Jarabono: 20 dol.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm. Pĉk.
54175-49. Jarabono: 540 lfr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, I.R.
3015 BC Rotterdam Jarabono: 36 n.gld.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la Administracio
aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu
lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn
nur por la tuta kalendara jaro.

ISSN 0211-9056

KUN OPTIMISMO AL 1983



Prof. D-ro Ivo Lapenna
Prezidanto de
la Internacia Centro de la
Neŭtrala Esperanto-Movado

Post la kunfandiĝo de Internacia Esperanto-Ligo kaj la ĝeneva UEA en 1947, por kio la subskribinto mem multe laboris, kaj la akcepto de la Statuto de la nova UEA en aŭgusto de 1948, estis elektita la unua Estraro de la Asocio. En ĝi troviĝis ankaŭ Hans Jakob. Okaze de la unua Estrara kunsido en la hipotezita domo de UEA en la vilaĝo Heronsgate proksime de Londono, dum paŭza promenado en la ĝardeno Hans Jakob kaj mi konversaciis pri la necesaj agadoj de la unuiginta neŭtrala Esperanto-Movado. Tiun konversacion mi vivece rememoras, ĉar Hans Jakob, nun jam delonge forpasinta, je mia granda surprizo asertis, ke por li gravas ne Esperanto, sed sole UEA. Aliflanke, mi klarigadis, ke esencaj estas la interesoj de Esperanto kaj de la humanecaj idealoj ligitaj al ĝi, kaj ke por mi UEA aŭ kiu ajn alia organizaĵo valoras nur tiom, kiom ĝi kapablas protekti kaj progresigi tiujn interesojn. Identan opinion mi havis longe antaŭ tiu konversacio, fakte ekde kiam mi komencis aktivi por Esperanto en 1928, kaj plu konservas ĝin.

Tial, interalie, laŭ mia iniciato N.E.M. lanĉis kaj prilaboris la ideon de komunaj agadoj por kiel eble plej efike kaj fruktodone celebri la Jubilean Jaron 1987 en la intereso de la Internacia Lingvo.

Kuraĝigaj Signoj

Juĝante laŭ tiu kriterio, oni povas rimarki plurajn kuraĝigajn signojn por nia afero en 1983.

Antaŭ ĉio, tre kuraĝiga estas la *pozitiva reago al nia iniciato* fare de la vastaj tavoloj de la esperantistaro kaj de multaj apogantoj de la internacilingva ideo ekster la Esperanto-Movado. Kvankam la preparlaboroj ne progresas tiel kontentige, kiel estus dezirinde, tamen plia kunsido de la provizora laborgrupo, pri kio aperas informo aliloke en tiu ĉi numero, verŝajne alportos konkretajn pozitivajn rezultojn. Espereble tre baldaŭ povos esti establita kompleta listo de ĉiuj partoprenantaj organizaĵoj kaj instancoj, de iliaj reprezentantoj en la Internacia

Komuna (Kupola) Komitato por la Jubilea Jaro, kaj akceptitaj la projektoj de la Baza (Kadra) Programo kaj de la Procedura Regularo. Nur post tio, verŝajne jam en printempo, povos okazi la plenkunsido de la tuta Komitato, kies ĉefa tasko estos akcepti per unuanimaj decidoj la definitivajn tekstojn de tiuj bazaj dokumentoj kaj tuj ekagi konforme.

Post la sukcesa Konferenco de N.E.M. en Vilafranca del Penedés, ĉio indikas eĉ pli grandan sukceson de la 9-a *Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado* en Graz de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1983. Jam nun la nombro de aliĝintoj superas tiun de la antaŭaj jaroj en la sama periodo. La interesiĝo daŭre kreskas kaj oni prave povas antaŭvidi, ke la elstare grava laborprogramo de la Konferenco, rilatanta ĉefe al la Jubilea Jaro, kiel ankaŭ la centra situo de Graz kaj la ravaj belaĵoj de tiu historia urbo aldone al la kulturaj kaj distraĵeroj, altiros ankaŭ tre multajn, kiuj ĝis nun ne havis la okazon partopreni. La fakto, ke nia Konferenco okazas tuj post la UK en Budapeŝto kaj la SAT-Kongreso en Linz (30.07. - 05.08.83), faciligos la aliĝon al tiuj, kiuj deziras partopreni kaj unu el la du Kongresoj kaj la Konferencon.

Tre ĝojiga estas la kreskanta rolo de *Horizonto* en la ĝenerala Esperanto-Movado. Ekzistas atestoj, ke eĉ personoj, kiuj pro nescio pri la ekzisto de *Horizonto* aŭ pro timo ĝis nun ne abonis ĝin, legas hazarde trovitajn numerojn de la unua ĝis la lasta paĝoj, kaj estas impresitaj de la enhavo, lingvo kaj aspekto. En kelkaj t.n. "nepagipovaj" landoj unuopaj ekzempleroj cirkulas de amiko al amiko kaj estas avide legataj de dekoj aŭ eĉ pluraj dekoj da personoj. En tia situacio, la nombro de abonantoj tre kredeble duobliĝos en 1983. Ĝi certe povos eĉ triobliĝi, se ĉiu abonanto tuj renovigos sian abonon kaj havigos almenaŭ unu plian.

ICNEM

Kuraĝigaj signoj rilatas ankaŭ al ICNEM. Kiel oni povas legi sur la interna kovrilpaĝo de *Horizonto*, ICNEM nek estas, nek celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo. Ĝia ĉefa celo estas daŭre manifestadi la partipolitike kaj religie neŭtralan Zamenhofan esperantismon. Tial ĝi certigas ankaŭ la senĝenan, regulan publikigadon de *Horizonto*. Dank'al la fakto, ke la tuta laboro en ICNEM kaj lige kun *Horizonto* estas farata sindone kaj absolute senpage, la financa bazo estas solida, fakte bonega. Tiurilate ni havas neniajn zorgojn. Preskaŭ kun plena certeco oni povas antaŭvidi, ke ne nur ĉiuj membroj baldaŭ pagos siajn kotizojn por 1983, sed ke aliĝos ankaŭ pluraj novaj. Tio ebligos al ICNEM vastigi la agadojn, precipe lige kun la Jubilea Jaro, kaj al la redakcio de *Horizonto* eĉ pli ampleksigi, variigi kaj entute plibonigi la enhavon en la alloga nova vestaĵo. Ĉiu leganto povas helpi ĉu per aliĝo al ICNEM, se li/ŝi ankoraŭ ne estas membro, aŭ per havigo de plia membro, se li/ŝi jam estas.

Persiste

Kiel en la pasinteco, La Plenuma Komitato de ICNEM kaj la Redakcio de *Horizonto* persiste klopodos venkadi la obstaklojn, rapidigi la preparlaborojn por la Jubilea Jaro kaj mem maksimume kontribui al komunaj fortostreĉoj por ĝia sukceso. Se tamen, malgraŭ niaj sinceraĵoj klopodoj, niaj esperoj rilate la komunajn agadojn perfidos nin, pro la interesoj de Esperanto ni tre bedaŭros tion, sed nia optimismo ne forlasos nin: ni solaj plenumos nian socian kaj kulturen devon laŭ niaj eblecoj. En ambaŭ kazoj ICNEM kaj *Horizonto* kalkulas je via helpo per diskonigo de niaj ekzisto kaj celoj, membriĝoj, abonoj, abonigoj de geamikoj en "nepagipovaj" landoj, multnombraj aliĝoj al la Konferenco en Graz, unuvorte per ĉiufanka apogo.

Ankaŭ vi rigardu optimisme al 1983. Kaj per via optimismo kontribuu al fortikigo de la nia.

Ivo Lapenna

Nova belaspekta 4-paĝa informilo pri ICNEM kaj HORIZONTO kun aliĝilo kaj abonilo estas senpage havebla de la administracio. Petu tiom da ekzempleroj, kiom vi bezonas por varbi novajn abonantojn aŭ por havigi pliajn membrojn de ICNEM inter viaj geamikoj kaj gekonatoj.



ANKAŬ OMBRON MI AMAS

Kutime oni pensas, ke nur suno, lumo, feliĉo kaj ĝojo estas belaj, kaj ke ombro, mallumo kaj morto estas malbelaj. Ankaŭ mi opiniis tiel - pli frue. Nun mi trovas belecon ankaŭ en la ombro kaj malfeliĉo.

Troviĝas branĉoriĉa, fortika kaŝtanarbo en la korto de la iama domo de unu el la plej elstaraj verkistoj de Danio, Ludvig Holberg (la dana Molière). Ĝi situas vidalvide de la universitata biblioteko en malnova, ĉarma strateto de Kopenhago. Ofte mi promenas tie. Mi amegas la sunon kaj la lumon. Tamen mi ofte rigardas tiun arbon, kiu brilas - kaj la aero spiras. Ĝi ŝatas sian ombron sur la straton, kaj sur la ŝtona pavimo oni vidas la ombroludon de ĝiaj folietoj. Absolute rave kaj poezie - ankaŭ en tiu ĉi frua aŭtuno, same kiel en majo kaj junio, kiam ĝi estas la plej bela.

Mi pensas pri la vivo. Ankaŭ ĝi estas plena de ombroj. En la teda grizo de rutino ili ne ekzistas. Nur suno kaj lumo donas ankaŭ ombrojn.

BI

PADERBORN 1982: PLIA SUKCESO

La Paderbornaj Novembraj Renkontiĝoj jam fariĝis tradiciaj. La ĉi-jara, 7-a laŭvice, ne okazis en la Instituto pri Kibernetiko, kiel en la antaŭaj jaroj, sed en la Universitato mem. La abunda programo konsistis el ĝenerala parto kaj tri sekcioj: 1. Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo, 2. Universitata Instruado, 3. Kibernetika Pedagogio. Entute estis pli ol 20 prelegoj kun postprelegaj diskutoj, se la tempo permesis.

Ĉefprelego

La tuta aranĝo komenciĝis la 10-an de novembro per prelego de Prof. D-ro Ivo Lapenna (Universitato de Londono) pri "Juraj Aspektoj de Informperdo pro Tradukoj" en la Filozofia Fakto de la Universitato. Prezidis Prof. D-ro H. Stachowiak, la ĉefo de la Fakto, kiu en mallonga germanlingva parolado prezentis al siaj kolegoj, multnombraj gestudentoj kaj aliaj interesitoj, la personecon de Prof. Lapenna, la grandan influon de lia scienca verkaro kaj lian ĝeneralan sciencan kaj universitatan laboron sur la vasta kampo de internacia juro, internaciaj rilatoj kaj kompara juro.

Enkonduke la preleganto emfazis la gravecon de jura informperdo. "Se traduko de literaturaĵo" - li diris - "povas senigi verkon de cirkonstancaj agordoj kaj poeziaj nuancoj, tamen sen pliaj malutilaj sekvoj, traduko de jura teksto povas facile perdi la originalan informon, ofte eĉ doni komplete eraran informon, tial ankaŭ kaŭzi erarajn interpretojn kaj aplikojn de juro." En la sinsekvaj partoj la preleganto koncize prezentis la nunan lingvan staton en internacia kaj kompara juro (doktrino kaj normjuraj tekstoj), kaj la multnombrajn problemojn, kiujn kaŭzas la multlingveco. Per pluraj ekzemploj, parte el la propraj spertoj, li montris kiel pro la karaktero de juro, pro semantikaj malsamecoj de juraj terminoj en diversaj internaj juraj sistemoj, aŭ pro la nekompetenteco de la tradukantoj, perdiĝas la senco de la originala mesaĝo, kio siavice kaŭzas miskomprenojn, jurajn disputojn kaj multkostajn procesojn. Kompreneble, ankaŭ verkante en la Internacia Lingvo la aŭtoroj renkontas malfacilaĵojn, kiujn pro la malsameco de signifoj en diversaj internaj juraj sistemoj neniu lingvo povas plene solvi. Tamen, laŭ la preleganto, la malfacilaĵoj estas multe malpli grandaj, ol en la naciaj lingvoj. Tio ŝuldiĝas al la strukturo de Esperanto, kies pozitivaj trajtoj estas fleksebleco, maksimumaj eblecoj de derivado kaj facileco, per kiu oni povas enkonduki novajn necesajn fakajn terminojn.

Prof. Lapenna prelegis en la Internacia Lingvo en sia konata brila stilo. Tre adekvate tradukis en la germanan Prof. D-ro H. Frank. La enhavo de la prelego, la

flua kaj belsona Esperanto de la preleganto, kaj la glata tradukado de Prof. H. Frank lasis bonegan impreson. La diskuto post la prelego daŭris plian horon. Du lokaj gazetoj informis pri la prelego kaj la tuta Renkontiĝo. Poste Prof. Lapenna estis longe intervjuita de ĵurnalisto de la Germana Presagentejo.

Laboro en Sekcioj

En la scienca programo de la 1-a sekcio troviĝis dek prelegoj. Aparte menciindaj estas la tre interesa prelego de D-ro Silvio Stoppoloni (Firenze) pri "Priĵura Dokumentado", tiu de D-ro R. Fischer (Münster) pri "Algoritmo por Decido pri Simileco de Germanaj Antaŭnomoj", kaj la du prelegoj de A. Golonka (Gliwice) pri "Unua Afikstipa Generilo de Esperantaj Vortoj" kaj "Rimarkoj pri Matematika Terminologio en Esperanto". Ankaŭ la dua prelego de Prof. Lapenna altiris la plej multnombrian aŭskultantaron. En tiu ĉi sekcio li prelegis pri "Jura Terminologio en Esperanto: Problemoj kaj Eblaj Solvoj". Post unuhora pritrakto de la temo li konkludis, ke Esperanto sendube pli taŭgas en la sferoj de supernacia, internacia kaj kompara juro, ol kiu ajn nacia lingvo, sed ke, bedaŭrinde, pro la nekontentiga scio de Esperanto, precipe de la ekzistantaj juraj terminoj, kaj pro la preskaŭ nekredebla foresto de lingva disciplino, la grandaj eblecoj de la Internacia Lingvo estas neutiligataj, ofte eĉ detruataj. Resumo de tiu prelego aperos en la sekvanta numero de *Horizonto* kaj ampleksa artikolo en *Internacia Jura Revuo*, laŭ la promeso de Prof. Lapenna dum la preskaŭ unuhora postprelega diskuto.

La programo de la 2-a sekcio listigis ses prelegojn rilatantajn al aŭdovidaj komunikiloj (D-ro E. Jarmark, Paderborn), universitata didaktiko en la instruado de fremdaj lingvoj (Prof. D-ro Mainusch, Münster), video-elsendoj en fremdlingva instruado (Prof. D-ro Oehschlāger, Hannover), k.a. D-ro W. Bormann, kiu instruas Esperanton en la Universitato de Hamburgo, en tre bona kaj objektiva prelego prezentis kaj analizis la historieton de tiu instruado kaj la nunan staton.

En la 3-a sekcio la programo antaŭvidis plurajn prelegojn pri kibernetika pedagogio, ĉefe pri kibernetiko kaj informado en psikologio, en klerigaj kaj lingvaj sciencoj. Prelegis Prof. D-ro Lansky, D-ro Kerndl, D-ro Lehner, k.a.

La prelegoj okazis aŭ en Esperanto aŭ en la germana, sed, bedaŭrinde, sen simultana traduko en la alia lingvo. La sola escepto estis la ĉefprelego, kiel menciite supre.

Aliĝu kaj instigu viajn geamikojn aliĝi al la

GRAZ.-URBO DE LA 9-a INTERNACIA KONFERENCO DE N.E.M.

La Provizora Programo promesas al vi treege interesan semajnon.

Aliaj Programeroj

Dum la renkontiĝo okazis interkona vespero, prezento de filmo pri Luksemburgio kun Esperanta komento, magiaĵoj de la tre lerta kaj simpatia Triksini en bonega Esperanto, ĉina festa rizmanĝo, Zamenhof-festo, la jara ĉefkunveno de la Eŭropa Klubo, gaja vespero en la ejoj de la Tenisklubo, pluraj komunaj manĝoj kaj multaj personaj kontaktoj.

Entute, tre sukcesa renkontiĝo. La ĉefa organizanto estis S-ro Dipl.paed. G. Lobin, sed Prof. Frank kaj lia tuta familio donis siajn helpajn manojn ĉie. Ili, kune kun Prof. Stachowiak, la respondeculoj de la tri sekcioj kaj ĉiuj prelegantoj, meritas gratulon kaj dankon. Tia prelegaro, grandparte sur universitata nivelo, estas instrua por la interesitoj kaj multe helpas al fortikigo de la pozicio de Esperanto en sciencaj rondoj.

Simpla partopreninto

P.U.

El niaj Organizaĵoj

NOVA NUMERO DE INTERNACIA JURA REVUO

Komence de decembro aperis n-ro 2/82 (26) de *Internacia Jura Revuo (IJR)*, organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), kun riĉa kaj varia enhavo, interesa por ĉiuj kleraj personoj.

En tiu ĉi 48-paĝa kajero troviĝas daŭrigo de la serio pri la koncepto de krimo laŭ diversaj naciaj juraj sistemoj. Temas pri artikoloj de D-rino M.R.Urueña (hispana juro), D-ro D. Koncz (hungara juro) kaj advokato M. Noret (franca juro). En la antaŭa n-ro aperis ampleksa kompara studo de Prof. D-ro I. Lapenna pri la sovetia kaj jugoslavia konceptoj de krimo, kaj artikoloj pri la sama demando laŭ la aŭstria kaj kanada juro. En n-ro 2/82 elstaras la daŭrigo kaj fino de la esencaj trajtoj de "Farado de Traktatoj kun Fremdaj Ŝtatoj" de E. Amlie, trad. de kand. jur. T.A. Hoeg. Recenzo de grava verko kaj multnombraj mallongaj eroj en la rubriko NOTOJ (interalie pri du juĝoj de la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj, elekto de juĝistoj en RSFSR, origino de fianĉaj ringoj, senpartieco de parlamentanoj, jura terminaro kaj jura movado en Esperanto) kompletigas la kutimajn rubrikojn. La Oficiala Informilo sciigas, ke la jarkunveno de IEAJ okazos en Graz dum la 9-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado (06-13.8.83) kaj ke D-ro Klaus Perko, sekretario-kasisto de IEAJ reprezentas la Asocion en la Internacia (Kupola) Komitato por la Jubilea Esperanto-Jaro 1987, dum lia anstataŭanto estas Prof. D-ro St.C. Anagnostakis, vicprezidanto de IEAJ.

Internacia Jura Revuo aperas du fojojn jare kun varia enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro. Ĉiu kajero havas 48 paĝojn plus kovrilojn. Kvankam sur alta faka nivelo, la stilo estas popularscienca en tre bona Esperanto. La membroj de IEAJ ricevas la revuon senpage, sed IJR estas abonebla ankaŭ ekster la membreco. La membro-kotizo estas 120 aŭstria ŝilingoj kaj la nura abono same tiel 120 ŝil. La aliĝilojn, kotizojn kaj abonojn akceptas la sekretario-kasisto, samtempe redaktoro de IJR, D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Austrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

AMLEDO

laŭ William Shakespeare: Hamleto

Something is rotten in the state of Denmark.
(Estas io putra en la dana ŝtato)

To be or not to be, that is the question.
(Esti aŭ ne esti, jen la demando)

There are more things in heaven and earth...
(Troviĝas io pli inter ĉielo kaj tero (ol supozite))

Frailty? Thy name is Woman!
(Febleco? Via nomo estas Virino!)



Tiujn ĉi kvar frazojn de genia dramisto scias la plej multaj nur iom kleraj homoj en la tuta mondo. Ili scias ilin, ofte ne konsciaj, ke ili estas ĉerpitaj el la plej fama dramoverko de William Shakespeare: *Hamleto*. Multaj konsideras Shakespeare la plej granda dramisto de la mondo.

Per *Hamleto* Shakespeare kreis la plej pridiskutitan dramon de ĉiuj tempoj. La domina ĉefpersono Hamleto (origine en la dana: Amled) estas dezirulo al ĉiu lerta aktoro. La dramo estas ofte ludata en la dana kastelo *Kronborg*, kelkfoje kun eksterlanda, ĉefe skandinavia aŭ angla ĉefaktoro. La kompleksaj karakteroj de la aktoroj estas objektoj por senfinaj ebloj de interpretado.

En la jaro 1894 aperis la dramo kaj tragedio *Hamleto* tradukita en Esperanton de d-ro Zamenhof mem. En 1964 aperis la 8-a eldono.



Lorenz Frølich, 1852

En 1981 tradukis la dana instruisto Mogens Rude Andersen la kernon de tiu ĉi dramo, la nudan - ni diru skeletan - rakonton pri Hamleto. Kun ĝi ekkonatiĝis Shakespeare, kiam li, kiel oni supozas, vizitis *Kronborg*.

Eldonejo Perspektivo eldonis tiun tradukon de Mogens Rude Andersen - esperante, ke ĝi fariĝu legolibro por lernantoj en progresaj kursoj de Esperanto. Por lernantoj finintaj komencan kurson ni havis la ĉarman legolibron Karlo de Edmond Privat. Kial ne doni al la pli progresintaj lernantoj valoran, streĉan kaj edukan, sed tamen facile legeblan legolibron, tiel ke ili havu fortan deziron legi la dramon mem kaj poste eble ankaŭ la aliajn teatraĵojn de Shakespeare? Plej sincere ni povas rekomendi "Amled" por perfektigaj kursoj.

Peter Zacho

KUNSIDO DE LA PROVIZORA LABORGRUPO POR LA JUBILEA JARO

La kunveno de la Provizora Laborgrupo por la Jubilea Jaro 1987, elektita de la delegitoj de organizaĵoj reprezentitaj en Münster la 30-an de majo 1982, okazis en Paderborn dum la t.n. Paderborna Novembra Renkontiĝo. El la ses membroj de la Laborgrupo ĉeestis nur S-ro T. Bormann, Prof. H. Frank, S-ro G. Maertens kaj la subskribinto, dum S-roj H. Sonnabend kaj R. Corsetti ne alvenis.

Okazis nur du kunsidoj. S-ro Maertens proponis Skizon de Procedura Regularo. Antaŭ la komenciĝo de la kunveno la subskribinto prezentis la sugestojn de la 8-a Internacia Konferenco de N.E.M. por kompletigo de la Skizo de Baza Programo por la Jubilea Jaro, publikigita en n-ro 1/81 de *Horizonto*, aprobita poste de la 7-a Internacia Konferenco de N.E.M. kaj distribuita en majo 1982 al ĉiuj partoprenantaj organizaĵoj.

Jen la teksto de tiuj sugestoj:

Nomo (rilatas al 1. Celo): JUBILEA ESPERANTO-JARO

1887 - 1987

aŭ

JUBILEA JARO DE LA INTERNACIA LINGVO (ESPERANTO)

1887 - 1987

Organizaj Demandoj (rilatas al 2.1.8)

Aldoni: Tiucele konsideri ankaŭ la Projekton de KCE en La Chaux-de-Fonds por la Jubilea Jaro.

Ĉefaj Agadoj (aldono al 3.)

1. Revivigi la Proponon, prezentitan al Sekretariato de UN en Novjorko en 1966, kaj kampanjo por pliaj apogoj.
2. Renovigi la agadojn cele al Interŝtata Konvencio por Laŭgrada Enkonduko de Esperanto en la Lernejojn.
3. Apogi la proponon de KCE organizi en Ĝenevo la Trian Internacian Konferencon pri Instruado de Esperanto, konforme al pkto (b) de ĝia Projekto.

PROpono PRI ESPERANTO AL EŬROPA PARLAMENTO

La redakcio ĵus sciigis, ke S-ro Ernest Glinne, membro de la Eŭropa Parlamento, el Bruselo prezentis la 22-an de novembro 1982 al la Eŭropa Parlamento proponon de Rezolucio por allaso de la Internacia Lingvo (Esperanto) en la instruprogramojn de la duagrada kaj superaj lernejoj de la landoj apartenantaj al la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo.

En siaj konsideroj S-ro Glinne, kiu apartenas al la Socialista Grupo de la Eŭropa Parlamento, konstatas la lingvajn malfacilaĵojn "disigantajn la popolojn pli grave ol iu ŝtatlimo", mencias la Rezolucion de Unesko de 1954 favore al Esperanto, atentigas pri la agado en la franca parlamento por enkonduko de Esperanto kiel nedeviga instruobjekto en la superan instruadon, kaj proponas, ke la Eŭropa Parlamento invitu la Konsilion de Ministroj ekzamenigi la taŭgecon enkonduki la lingvon Esperanto kiel nedevigan objekton en la mezgradan kaj altgradan instruadon de ĉiuj Ŝtatoj-Membroj de la Komunaĵo. Pri la eventualaj sekvoj de la propono *Horizonto* informos en la sekvanta numero.

LA AKADEMIO DE ESPERANTO

D-ro Albert Goodheir ĵus ekŝiĝis el sia funkcio de sekretario de la Akademio de Esperanto, ĉar li "trovas la Akademion en ĝia nuna stato nekontentiga". Analizo pri la profunda krizo en la Akademio aperos en la sekvanta numero de *Horizonto*.

4. Agadoj direktitaj al uzo de Esperanto en oficialaj aŭ duonoficialaj komunikoj al multlingva publiko, precipe en
 - (i) poŝtaj respondkuponoj
 - (ii) telefonlibroj kaj telefonĉeloj (ekzemplo de Nederlando)
 - (iii) horaroj fervojaj, aertrafikaj, ks.
 - (iv) informoj kaj indikoj sur ŝoseoj
 - (v) informoj kaj indikoj en muzeoj, artgalerioj, foiroj, ekspozicioj, ks.
 - (vi) eventuale en aliaj sferoj
5. Komuna simbolo, uzebla kiel afiŝo, flugfolio, glumarko ks., nepre entenanta la vorton "Esperanto" konforme al la nomo (v. supre).

Parte pro la tro limigita tempo de entute ĉ. 3 horoj, parte pro la foresto de du membroj, estis eble pritrakti sole parteton de la tagordo, fakte nur tri el la ok paragrafoj de la skizo de Procedura Regularo. Tial oni decidis okazigi plian kunvenon antaŭ la fino de 1982 en loko kaj tago konvena por ĉiuj membroj, plej verŝajne dum la tuta 18-a de decembro en Rotterdam. Pri la laboro kaj decidoj de tiu kunveno *Horizonto* informos en la sekvanta numero.

Ivo Lapenna

LA KONGRESAN ELDONON DE "HEROLDO", KIU PERMESIS KAJ KIU FINANCIS?

En la nuna momento okazas kunsido de la provizora laborgrupo, kies celo estas prepari la kunvenon de la Internacia Komuna (Kupola) Komitato por kunordigitaj agadoj okaze de la 100-jara datreveno de Esperanto en 1987. Kun streĉa atento ni atendas la rezulton. Streĉe, ĉar la subfosa laboro de *Heroldo* komenciĝis jam je la unua signo de pozitivaj reagoj al la propono pri komuna agado farita de Prof. D-ro Ivo Lapenna, kaj publikigita en *Horizonto* n-ro 4/81. La subfosado unue montriĝis en tre malica ofenda kaj mensoga artikoleto en *Heroldo* n-ro 7/82. Poste, same kiel en la pasinteco, sekvis kelkaj "konfidencaj" skribaĵoj, inspiritaj de la sama "redakcio" de *Heroldo*.

Kial tiu gazeto subite havas tiom da prestiĝo ĉe U.E.A.? Antaŭ Hamburgo ĝi sisteme kontraŭ-agis la saman asocion, sabotadis la agadojn, kaj ĝiaj posedantoj plej aktive partoprenis en la hontinda puĉo. Intrigoj, sekretaj "strikte konfidencaj" cirkuleroj plenaj de atakoj kaj insultoj kontraŭ meritplenaj esperantistoj, kaj precipe kontraŭ Ivo Lapenna, estis iliaj laboriloj. Kaj nun ili daŭrigas per samaj rimedoj: "1987, jaro de interpaciĝo?" estis la hipokrita titolo de la menciita subfosa artikoleto. Ĉe homoj, kiuj nur legas la titolojn, tiu teksto vekas senton de apogo. Des pli ŝoka estas la kalumnia-insulta enhavo. Responde al nova membro de ICNEM, kiu prave protestis pro tiu subfosa artikoleto, ili ĝentile malkovris, ke ili dum jaroj sentis la devon malkovri iajn "erarojn" de Ivo Lapenna, sed kompreneble sen mencio de kiu ajn el tiuj nekonataj "eraroj". Ĉu estas eraro esti pli inteligenta, pli klarvida kaj pli laborkapabla kaj kreiva ol la plej multaj, kaj scii tion? Ĉiu matura homo konas siajn talentojn kaj uzas ilin laŭeble. Estas feliĉa avantaĝo por nia tuta afero, ke tia elstara homo sentas sian "socian devon" tiel forte, ke li spite al ĉiuj atakoj tamen emas daŭrigi, kaj ke li almenaŭ ĝis nun kapablis bremsi la malfeliĉan deflankiĝon de nia movado. Personkulto, iuj diras! Ne, oni nur konu la kverkon, kreskantan inter arbustoj. Kial ili bezonas envii la kverkon? Ĉu ili ne komprenas, ke ĝuste la kverko beligas la pejzaĝon, kaj eĉ plivalorigas la arbustaron kaj inverse, sed sen la kverko la tuta elrigardo estus nur teda.

Nun pri U.E.A. kaj *Heroldo*. *Heroldo* aperis ĉiutage dum la UK en Antverpeno kaj estis eĉ senpage distribuata al ĉiuj kongresanoj. Ĉu tio signifas, ke *Heroldo* estas de nun la "dua" organo de U.E.A.? Antaŭ Hamburgo ĉiutage aperis la Bulteno de la Kongresa Gazetara Servo. Ĉu tiu institucio ankoraŭ ekzistas, aŭ ĉu *Heroldo* transprenis ĝian taskon kaj laŭ kies instigo? *Monato*, kun la subtitolo "internacia sendependa magazino", informis en sia numero 8/82 pri la eldonado kaj skribis, ke tiujn 2-paĝajn 5 numerojn "bele presis - *Monato*". Ĉu *Monato* laboris senpage,

PLIAJ KRITIKAJ RIMARKOJ PRI LA UK EN ANTVERPENON

(Ĉiuj laŭ organoj de du LA-oj aliĝintaj al UEA)

En la lasta numero de *Horizonto* ni citis el la revuo *Esperanto* kelkajn objektivajn kritikojn pri la UK en Antverpeno. Sube ni laŭvorte citas el *Komuna Esperanto Gazeto* (KEG), oktobro 1982, kaj el *Novzelanda Esperantisto* (NZE), n-ro 5/82, ambaŭ organoj de landaj asocioj de UEA. Tiajn kritikojn ni rigardas kiel pozitivan progreson kompare kun la antaŭaj senkritikaj laŭdegoj de ĉio.

Ĝenerale: "Universala Kongreso estas ĉiam gaja renkontiĝo de aktivaj vojaĝemaj esperantistoj tutmondaj" (KEG). *Nia komento:* Ĉu vere tiel? Ĉu la UK ĉiam estis nur "gaja renkontiĝo"? Ĉu antaŭ Hamburgo la UK ne estis ĉefe laboraj kaj kulturaj en atmosfero de amikeco kaj kunlaboro, kio ĝojigis ĉiujn aktivulojn kaj ne-aktivulojn?

Interkona Vespero: "La Interkona Vespero donis muzikon kaj kantadon en tro malgranda, netaŭga kaj varma salono" (KEG). "La Interkoniĝa vespero estis sufiĉe brua kaj malbone organizita" (NZE). *Nia komento:* Ne tre taŭga ejo por "gaja renkontiĝo".

Inaŭguro: "Unue faris paroladon diplomato el Tunizio kaj li parolis en tre korrekta franca lingvo dum unu horo. La granda plimulto de la ĉeestantoj nenion kom-

Ekzistas, aktivas la Centro de N.E.M. — Por ke U.E.A. retrovu sin mem.

kun perdo? Presigo eĉ de tre modesta gazeto, versajne en 2000 ekzempleroj, kostas tre multe. Mi konas nek la aspekton nek la enhavon de tiuj 5 numeroj, sed principe mi dezirus scii, kiu fakte pagis la kostojn, ĉu Monato, ĉu U.E.A., ĉu la kongresa kaso, ĉu *Heroldo* mem, aŭ ĉu la mono venis de iu alia fonto, kaj se jes, de kiu? Mi volus ankaŭ scii, ĉu U.E.A. permesis la distribuadon, kiel ordonas la Kongresa Regularo, aŭ ne? Tria demando: Ĉu kun aprobo aŭ sen aprobo, kiu funkciulo aŭ organo de U.E.A. respondecis pri la enhavo, la publikigo kaj la distribuo de tiuj 5 numeroj?

Universala kongreso estas la plej grava jara manifestiĝo de la Internacia Lingvo. Ĝi ne estas afero de privatuloj. La universalaj kongresoj estas organizataj de U.E.A. kaj pro la nombro de kongresanoj tio koncernas — ĝis iu grado — la tutan Esperanto-Movadon. Tial U.E.A. devus publike respondi al la ĉi-tie starigitaj demandoj, precipe al la demando kial ĝuste tiu gazeto estis elektita por tiu rolo, la sola gazeto, kiu per tiel hontindaj metodoj klopodas malebligi komunajn agadojn por la Jubilea Jaro.

Lis Thune

Prezidentino de la Dana Sekcio
de I.L.E.I.

prenis kaj desur la podio, kie mi sidis inter la naciaj reprezentantoj, mi povis vidi, ke duono de la aŭskultantoj ĝuis dolĉan dormon. Kial oni permesas tian aferon en Esperanta Kongreso, mi tute ne komprenas" (NZE). *Nia komento:* Plian fojon ne tre "gaja renkontiĝo". *Horizonto* jam starigis la saman demandon, sed ĝis nun neniu respondis.

"Virina Agado": "La kunveno...montriĝis esti prelego pri oratora arto, ne speciale por virinoj. Antaŭe en la salono oni diskutis kun la dorso al la resto de la publiko, kiu ne povis bone kompreni. Dekoj tial forlasis la salonon" (KEG). *Sen komento!*

La Tago de la Lernejo: "...estis enuiga afero por fakulo kiel mi, ĉar multaj prezentadoj estis iom naivaj kaj certe ne instruis novajn manierojn" (KEG). *Nia komento:* Se tiel, kial kompetentaj geinstruistoj ne prezentis la temon kaj ne partoprenis en la diskuto?


La Progresiga Kurso: "...egale bone povus esti 'Komenca Kurso', ĉar la temoj estis tro simplaj por multaj ĉeestantoj" (KEG). *Nia komento:* UK ne estas loko por kursoj de Esperanto (nek por progresantoj, nek por komencantoj), sed por laboro, diskutoj, kulturaj eventoj en Esperanto.

La fama "piedsigno": "La ĉefteatraĵo de la semajno, la hungara peco 'Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'profeto?' estis en miaj okuloj nur sensencaĵo. En la paŭzo mi fuĝis" (KEG). *Nia komento:* Kontraste, W. Auld estis tiel interesita, ke li vidis la teatraĵon du fojojn kaj tre bedaŭris, ke en la dua prezento "la nudajn mamojn de la du 'indiĝenaj' dancistinoj kaŝis grandegaj florgirlandoj" (v. pri tiu "sensacia" evento en la lasta *Horizonto*, p.149). Ne, ni ne vidis "la piedsignon de l'profeto", sed laŭ la ĝenerala reago de la spektintoj ŝajnas, ke "la piedsigno de l'profeto" fariĝos piedbato por la teatraĵo.

Informa servo pri - tualetejoj: "La informa servo estis nekontentiga. Ekzemple, kiam mi demandis kie estas la necesejo por viroj, la fraŭlino ĉe la ĝiceto respondis, ke ŝi tion ne scias, ĉar ŝi ĉiam uzas la necesejon por virinoj. Ĉu tio ne estas diskriminacio kontraŭ viroj? Ĉiuokaze, mi bedaŭris, ke ne troviĝis vira informanto en la ĝiceto..". *Nia komento:* Laŭ *Esperanto*, la virinaj membroj de la Estraro suferis "diskriminacion" pro la "speciala ĉambro por la Estraro" (v. la koncernan eron en la lasta *Horizonto* sur p. 149). Nun vidiĝas, ke ankaŭ la viroj suferis "diskriminacion", do dudirekta "diskriminacio", pri kio nepre necesis raporti en la organo de UEA kaj en organo de landa asocio! Pli frue ekzistis Informa Servo, kiu daŭre raportis pri la laboroj de la UK. Ŝajnas, ke en Antverpeno tiu informado havis tian karakteron, ke eĉ la indikoj pri la tualetejoj fariĝis gravaj. Eble tio malgrandigis la "gajecon de la renkontiĝo".

Kompilis kaj komentis
Kopenhaga Horizonto-Grupo

UNIVERSITATAJ PRELEGOJ EN ESPERANTO



*La Kolegio Holly Royde meze de bela parko.
La oktagona konstruaĵo estas la prelegejo.*


Ĉiujara evento tro malmulte konata estas la semajnfino de universitataj prelegoj en Manĉestro, kiu havas lokon en la rezida kolegio Holly Royde. Dum 15-17 oktobro 1982 D-ro Bernard Cavanagh, lekciisto pri Esperanto ĉe universitato Liverpool kaj Direktoro de tiu universitata kurso, prezidis je la naŭa fojo programon el naŭ prelegoj por proksimume 30 ĉeestantoj (ĉijare iom malpli pro malfrua anonco de la okazo). Gastprelegantoj estis tri: pri edukaj kaj socialaj temoj, emerita profesoro pri edukado (pedagogio) en Glasgovo Stanley Nisbet; pri japanaj moroj, kulturo, muziko kaj lingvo s-ino E. Rowe; kaj pri principoj de publika parolarto profesoro d-ro Ivo Lapenna.

Profesoro Nisbet stimulis diskuton pri siaj temoj per spritaj dialogoj el tri vidpunktoj, bende reproduktitaj kun voĉoj de William Auld, lia edzino kaj Albert Goodheir. S-ino E. Rowe, el sia klera kompetento kiel diplomito vivinta multajn jarojn en Japanio, skizis klare kun trafaj ilustroj la larĝan terenon alprenitan. Aparta regalo por la publiko estis la majstraj prelegoj de Ivo Lapenna. Ne nur la elokvento kaj ordo, ne sole la sonora voĉo katenis orelon kaj spiriton, sed nin sorĉis ankaŭ la elemento de humuro kaj anekdoto, kiun li plektis spontane en sian diskurson. Por pluraj el la ĉeestantoj tio estis la unua renkonto kun tiu granda oratoro, kaj se mi aldonas, ke kun la prelegoj iris ankaŭ amikaj konversacioj tra la semajnfino, dum la manĝoj kaj en sidoĉambro kaj trinksalono, oni komprenas, ke la okazo estis por multaj alta kaj neforgesebla pinto en sia esperanta sperto.

Efektive ĉiu el la naŭ prelegoj naskis viglan diskuton. Sola domaĝo estis, ke ĉijare D-ro Cavanagh (Kávana) mem - kiu dum la antaŭaj ok jaroj prezentis po tri prelegoj pri aktualaj temoj, ĉiam novaj, de kemio kaj fiziko, ĉi jare ne povis daŭrigi pro la postefikoj de aŭtomobila akcidento. Meritplena estas lia iniciato, liganta la universitatojn de Liverpool kaj Manĉestro: ĝi daŭru kaj floru dum ankoraŭ multaj jaroj!

Reto Rossetti

Jesper Neergaard



La dana skulptisto Jesper Neergaard, kiun **Horizonto** prezentis en sia maja-junia numero la pasintan jaron, grandanime disponigis sian belegan marmoran skulptaĵon kiel ilustraĵo por la afiŝo, kiu simbolu la manifestacion (1987) de ĉiuj organizaĵoj kaj instancoj, kiuj laboras per kaj por Esperanto. La proponita skulptaĵo simbolas kvazaŭ du sentemajn manojn, kiuj ŝirmas la feblan burĝonon, Esperanto.


Jesper Neergaard kreis dum internacia arta simpozio en Italio imponan marmoran skulptaĵon, kiun la dana urbo Holbæk aĉetis kaj situigis antaŭ sia nova urbodomo.

En la printempo 1982 la skulptaĵo estis ekspoziciita en Salon de Mai, Parizo. En tiu ĉi jaro Jesper Neergaard inter alie estas invitita al Grekio por krei monumentalan skulptaĵon el greka marmoro por Skironio Muzeo de Moderna Arto en Ateno, kaj li estas invitita por ekspozicii siajn verkojn ankaŭ en Musée de St. Maur en Parizo.


La skulptaĵo "Vita Nuova" dum kreado.



**Êu lia belega skulptaço
estu la simbolo por la
jubilea Jaro 1987?**



"Vita Nuova" ekspoziciita en Salon de Mai, Champs Elysées, Parizo, majo 1982.



9-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Graz (Aŭstrio), 6. - 13. aŭgusto 1983

Konstanta adreso ĉe: D-ro Klaus PERKO, Lendkai 111, A-8020 GRAZ

La preparaj laboroj por nia 9-a Konferenco bone progresas. La honoran protekton de la Konferenco afable transprenis:

D-ro Josef KRAINER, landestro (registarestro) de Stirio
S-ro Hans GROSS, viclandestro de Stirio
Prof. D-ro Kurt FREISITZER, rektoro de la Universitato Graz.

De la buroo de la landestro ni ricevis la informon, ke s-ro landestro D-ro KRAINER volonte estas preta, transpreni la honoran protekton de nia Konferenco, kaj jam nun deziras al ĝi sukcesan evoluon.

Similan sciigon ni ricevis de la buroo de la viclandestro s-ro GROSS.

La rektoro de la Universitato Graz, Prof. D-ro FREISITZER, skribis en persona letero, ke li volonte transprenos la honoran protekton, kaj ke li ankaŭ partoprenos en la solena inaŭguro la 7-an de aŭgusto 1983 kaj tie diros salutajn vortojn al la konferencanoj.

Estas jam certigite, ke la inaŭguro kaj la fermo de la Konferenco okazos en nova prelegejo de la Universitato, kiu situas iom ekster la urbocentro (ĉ. 20 minutoj de piedirado). Kelkajn paŝojn apud la Universitato troviĝas studenta hejmo, en kies ejoj okazos la Interkona Vespero kaj diversaj kunsidoj kaj kunvenoj en la kadro de la Konferenco. Ĉar tiu studenta hejmo dum la ferioj (monatoj de julio ĝis septembro) servas kiel hotelo, tie povos ankaŭ loĝi parto de la konferencanoj. (Ni menciis ĝin en la aliĝilo sub kategorio B/C). En la ĉirkaŭaĵo de la Universitato situas pluraj restoracioj, en kiuj oni povas manĝi je relative favoraj prezoj.

En distanco de ĉ. 10-minuta piedirado de la Universitato estas "Rosen-Hotelo" (menciita en la aliĝilo sub kategorio B). Tiu hotelo estas ankaŭ tre facile atingebla per autobuso de la stacidomo. - La sama autobusa linio gvidas ankaŭ al *Hotelo Academia* (kategorio A), situanta ankoraŭ du staciojn pli ekster la urbocentro (prezo de unulita ĉambro: 290 ŝilingoj), en Untere Schönbrunn-gasse, en parkosimila ĉirkaŭaĵo kun vilaoj kaj ĝardenoj. La Universitaton oni povas atingi de tiu hotelo ne nur per autobuso, sed ankaŭ promene (ĉ. 20 minutoj) aŭ per aŭtomobilo. (Tute ĝenerale ni devas tamen atentigi, ke la uzado de aŭtomobilo por la urbocentro de Graz ne estas konsilinda.) Tute proksime de Hotelo Academia troviĝas la pitoreska Hilm-lageto, preferata celo de promenadoj, kie oni povas veturi per remilaj boatetoj aŭ sidi en apudborda kafejo. Malantau la lageto estas granda, ombra arbaro; tie komenciĝas ankaŭ ŝatata arbara vojo gvidanta al la konata pilgrima preĝejo Maria-Trost (promenado de ĉ. unu horo).

Por tiuj konferencanoj, kiuj deziras loĝi en ankoraŭ pli komforta aŭ pli centra hotelo (kategorio A), ni povas rezervigi la deziritan ĉambron, sed oni devas kalkuli kun prezoj de pli ol 500 ŝilingoj po nokto. Laŭ via deziro povas esti hotelo apud la stacidomo (kiu siavice troviĝas iom ekster la urbocentro, sed je la kontraŭa flanko de la Universitato), aŭ rekte en la centro apud la ĉefplaco, aŭ pli proksime de la konferencejo (ĉ. 10-15 minutoj de piedirado). Se vi elektas tian alternativon, bv. sufiĉe baldaŭ skribi kaj sciigi viajn dezirojn, por ke ni ankoraŭ ĝustatempe povu rezervigi la ĉambrojn.

(daŭrigo sur p.28)



En la foto estas la ĉefa stacidomo de Graz. Maldekstre troviĝas moderna komerca centro. En la fono estas videblaj kametuboj (provincoj), kaj en la mezo estas ankaŭ industria urbo.



La supron de la kastelmonto de Graz oni povas atingi ne nur piede, sed ankaŭ komferte per kablofervojo.



D-ro Josef KRAINEP, landestro de Stirio, honora protektanto de nia Konferenco.



S-ro Hans GROSS, viclandestro de Stirio, honora protektanto de nia Konferenco.



"Hilm-lageto" en Graz, ĉe la rando de granda arbaro.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

77 Grasmere Avenue, Wembley, HA9 8TF, Middlesex, Britio.

N-ro 41

74. SOVETIAJ FRONTORGANIZAJOJ EN KONTRAKTAJ RILATOJ KUN UEA

En n-ro de marto-aprilo de la periodaĵo *Problems of Communism* (Problemoj de Komunismo) estas publikigita listo de la komunistaj partioj kaj de la sovetiaj frontorganizaĵoj (t.n. "transmisiaj rimenoj") en la tuta mondo, kun esencaj detaloj pri la membronombro de ĉiu partio en ĉiu unuopa lando, kaj la nombro de filioj en la kazo de la frontorganizaĵoj. La listo estas farita de R.F. Staar kaj la Hoover Instituto pri Milito, Revolucio kaj Paco en Stanford (Usono).

En la listo de la dek plej gravaj sovetiaj frontorganizaĵoj, kies agado estas senkondiĉe subigitaj al ordonoj kaj instrukcioj de Moskvo, troviĝas ankaŭ la Monda Federacio de Demokrata Junularo kun sidejo en Budapeŝto (en kontraktaj rilatoj kun TEJO, la Junulara Sekcio de UEA); la Internacia Unio de Studentoj kun sidejo en Prago (en amikaj rilatoj kun TEJO, la Junulara Sekcio de UEA); kaj la Monda Packonsilantaro kun sidejo en Helsinki, al kiu apartenas la t.n. Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kies ĉefuloj siavice regas en nombro da landaj Esperanto-organizaĵoj apartenantaj al UEA kaj estas komitatanoj de UEA kiel reprezentantoj de siaj respektivaj aliĝintaj landaj asocioj. Unu el ili, S-ro Aleksiev, samtempe membro de la Monda Packonsilantaro, estis elektita en 1981 Honora Membro de UEA.

Kiel ni informis en *Horizonto* n-ro 6/82, p. 155-156, D-ro H. Tonkin, nun Estrarano de UEA kaj ĝia reprezentanto ĉe la Sekretariato de UN en New York transdonis al la Sekretariato de UN petskribon pri malarmado de la Bulgara Sekcio de MEM kaj de BEA, kio praktike estas la sama afero. D-ro Tonkin faris tion ne kiel privattulo, sed en la nomo de UEA kiel ĝia oficiala reprezentanto ĉe UN.

Ĉio-ĉi plian fojon konfirmas la faktojn, analizojn kaj prognozojn en la verko *Hamburgo en Retrospektivo*. Tamen, plu troviĝas multaj, kiuj preferas fermi siajn okulojn, ol rigardi kaj vidi la realaĵon. Laŭ nia opinio estus urĝe necese, ke en tiu ĉi lasta momento, antaŭ ol estos tro-tro malfrue, la nuna gvidantaro de UEA plej atente ekzameni la partipolitikan influon en UEA por malebligi kian ajn plian partipolitikan kompromitiĝon.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.8 kaj 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo*, kaj ĉap. 3.3 kaj 4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

IRANO: PERSEKUTADO DE BAHAAŬOJ PLUDAŬRAS

(Daŭrigo de la antaŭa numero)

La situacio en Irano

Oni taksas, ke nuntempe vivas 300.000 bahaanoj en Irano. Jam de la tempo de Bab ili havis malfacilan sorton, ĉar la persekutado *neniam* ĉesis. Pro la instruoj de Bahauŭallah koncerne edukadon kaj la valoron de laboro, multaj iranaj bahaanoj atingis altajn postenojn kaj rimarkindan bonstaton, kio incitis envion en la cetera popolo. La mulaoj (islamaj klerikoj) kontraŭas la Bahaismon, ĉar ili timas perdi sian influon pro la bahaa instruo, ke hodiaŭ klerikaro estas superflua postrestaĵo el antikva tempo. La bahaa konvinko, ke ne nur la Islamo, sed same la aliaj religioj havas Dian devenon, plu aldonas al tiu ĉi malamo. Por ĉiu malfeliĉo okazinta en Irano oni kulpigis la Bahaanojn. Jen la historiaj faktoj:

Kiam islama teroristo atencis la ŝahon en 1896, oni sekve murdis Bahaanojn. En 1903, amaso de 6000 homoj kunpelis 100 Bahaanojn en la urbo Jazd kaj kruele murdis ilin. En 1906 okazis vera ondo de sangaj krimoj. Dum la unua mondmilito kompreneble la Bahaanoj fariĝis respondecaj pri la kaosa situacio. Ekzistas eĉ fotografaĵoj pri tiuj heroaj agoj kontraŭ la ekstermindajn herezulojn. Unu foto el la jaro 1916 montras tutan bahaan familion kun detranĉitaj kapoj; en la mezo sidas viro, tenante senkapan infaneton sur sia genuo kaj ties kapon en sia maldekstra mano.

Ĝis 1921 la persekutoj okazis pli malpli el "privata" iniciato, sed tio nun ŝanĝiĝis. La ŝaho efektivigis novan leĝon, laŭ kiu multaj Bahaanoj perdis siajn pensiojn. En la sekvantaj jaroj la ŝtato ĉiel premis la Bahaanojn: Ŝtataj oficistoj detruis sidejojn de Lokaj Spiritaj Asembleoj (administrataj organoj de Bahaismo) kaj la justico nenion entreprenis kontraŭ murdistoj kaj rabistoj, se ili krimis kontraŭ Bahaano. Bahaano ne povis fariĝi ŝtata oficisto aŭ dungito. Oni enkondukis leĝon, laŭ kiu nur islama, juda, kristana aŭ zoroastra geedziĝo estis legitima. Tiamaniere ĉiuj Bahaaj edzinoj fariĝis subite putinoj, kaj ĉar prostituado estas malpermesita, oni jen havis tute laŭleĝan motivon por pluaj persekutoj. En 1932 oni dekretis, ke prostituistoj povas esti enkarcerigitaj, kaj do preskaŭ ĉiu Bahaa plenkreskulo staris jam kun unu kruro en la malliberejo. En 1934 oni fermis la Bahaajn lernejojn, en kiuj edukiĝis infanoj el ĉiuj religioj. En 1940 multaj Bahaaj oficiroj estis devigitaj forlasi la armeon, kaj oni postulis de ili eĉ la repagon de la elspezoj por ilia eduko. En 1951 oni startis kampanjon kontraŭ la Bahaanoj sub la preteksto, ke ili kunlaboras kun la komunistoj.

En 1955 la registaro permesis al fanatika mulao alvoki per radio la iranen popolon al konvenaj paŝoj kontraŭ la Bahaanoj. Rezulte de tio, la polico okupis la nacian Bahaan centron kaj tute detruis ĝin. La ministro pri internaj aferoj deklaris, ke la "Bahaa sekto" estas malpermesita kaj ke ĉiuj Bahaaj centroj estos likviditaj. Tio kaŭzis veran orgion de detruado kaj perfortado, en kiu la polico mem fervore partoprenis. Ili eĉ ne hontis elfosi mortintojn sur la Bahaaj tombejoj. Ankaŭ pri tiuj ĉi fiagoj ekzistas fotodokumentoj, sur kiuj pozas altrangaj oficiroj kaj mulaoj, ridetantaj kaj fieregaj, svingante pioĉon en dioplaĉa servo kontraŭ la malamikoj de la unusola vera religio.

Pro la tutmonda indigno antaŭ tiuj faroj, la irana registaro tamen devis ĉesigi la pogromon. Sed neniam oni agnoskis la Bahaismo kiel religion, tute male, la kunvenoj restis malpermesitaj, ĉiaj aludoj pri Bahaismo estis forigitaj el lernejoj kaj historiaj libroj.

Nova flamo de persekutado ekbrulis en 1963, kaj kiam en 1965 Hovejda fariĝis ĉefministro, li komencis novan ondon de subpremado por montri, ke li ne estas Bahaano, ĉar oni suspektis lin pri tio.

En 1972 la irana registaro inventis specialan imposton kontraŭ la posedaĵo de Bahaaj komunumoj, la sanktaj lokoj, la tombejoj ktp. Kiam la ŝaho en 1975 fondis la ŝtatpartion Rastaŝiz kaj alvokis la popolon al membriĝo, kompreneble ĉiuj Bahaanoj rifuzis, ĉar laŭ sia kredo ili devas sin deteni de ĉia politika aktiveco. En 1978 la sekreta polico SAVAK organizis en la urbo Ŝirazo movadon kontraŭ la Bahaanoj. Rezulte de tio, ĉirkaŭ 300 domoj estis prirabitaj kaj bruligitaj. Spite al tio, la nuna registaro akuzas la Bahaanojn pri konspiro kun la ŝaha reĝimo kaj la sekreta polico.

Post la detronigo de la ŝaho la situacio eĉ pli akriĝis. Neniu leĝo protektas vivon kaj havaĵon de Bahaanoj, eĉ male, kiu atakas Bahaanon, povas esti certa, ke neniu proceso aŭ prizono atendas lin. Nur en oktobro 1978 okazis pli ol 90 kazoj de fizikaj atakoj kontraŭ Bahaanoj aŭ ties domoj kaj religiaj centroj. En decembro, 200 domoj estis prirabitaj kaj 300 bruligitaj aŭ alimaniere detruitaj. 10 Bahaaj vilaĝoj kune kun la kampoj kaj bestaro estis atakitaj, la enloĝantoj forkondukitaj en koncentrejojn. En Isfahano oni dinamitis Bahaan malsanulejon. En 1979 oni neniigis la domon de Bab en Ŝirazo, kiu estas unu el la plej sanktaj lokoj kaj havis netakseblan valoron historian.

Pri tiuj ĉi fiagoj la iniciatintoj fiere raportis publike en la gazetaro kaj atentigis precipe pri siaj meritoj dum la murdo-kampanjoj okaze de la elektoj al la parlamento en 1980. Ankaŭ la mulaoj demagoge agitas en la moskeoj kontraŭ la Bahaanoj. Ekde la starigo de la Revolucia Islama Respubliko pli ol 100 Bahaanoj estis murditaj, inter ili mondfamaj sciencistoj (ekz.e prof. Hakim), sed ne ĉiuj



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

Redaktas Salvador Gumà, Paseo Prim, 38-7-6, Reus, Tarragona, Hispanio.

Amled de Saxo, kompilis kaj tradukis Mogens Rude Andersen, Kopenhago, eldonis Eldonejo Perspektivo, 14 paĝoj, ilustr. prezo 15 dkr.

La esperantistoj legintaj la Ŝekspiran Hamleton legos profite tiun ĉi verketon pri la deveno de la granda verko.

Ŝajnas ke Amled vivis antaŭ ĉ. 1500 jaroj, ke Ŝekspiro vizitis Danlandon en la 17-a jarcento.

Verŝajne do li aŭdis pri la Amledlegendo ŝkribita latine de Saxo ĉ. la jaro 1200 kaj troviĝanta en la verko "Gesta Danorum".

Amled estas ilustrita kaj klare tradukita. Tamen, mi ankoraŭ devas grumbli pro la impertinenta ĉe ... "Konstruigis ĉe la malplej larĝa loko de Sundo, kastelon". Mi tute ne scias, kie oni ĝuste konstruis ĝin. Ne mankas lokprepozicioj: apud, tuj apud, aŭ, tuj sur la bordo, borde de...

Nun, sengrumble: "li kuŝis sur la pajloj". Pajlo estas plurelementa; do, li kuŝis sur pajlo aŭ sur pajlaĵo.

Salvador Gumà.

fare de iaj fanatikaj teroristaj bandoj. Multaj Bahaanoj estas mortkondamnitaj rezulte de procesoj, en kiuj oni akuzas ilin pri kunlaboro kun iuj sekretaj policorganizaĵoj, spionaj servoj aŭ cionismo. Pruvo: Israela vizo-stampo en la pasporto (kiu fakte devenas de la pilgrima vojaĝo al Hajfo).

Sed kelkfoje la akuzantoj ne estas tiel inventemaj kaj simple diras la veron: Akuzo pro Bahaismo - tio estas multe pli simpla kaj same efika. En septembro 1980 oni montris eĉ en la televido sep virojn, akuzitajn pro Bahaismo, kaj postulis de ili en la elsendo, ke ili malkonfesu sian religion. La plej maljuna inter ili estis 85-jara viro, kiu sub larmoj proklamis sian kredon je Bahauallah. (Alia akuzito estis la frato de mia amiko kaj nuna samurbano). Ĉiuj sep estis ekzekutitaj en Jazd, la 8-an de septembro 1980, kaj la Teherana gazetaro festis la ekzekuton kiel revolucion heroaĵon favore al la sankta Islama Respubliko. La familianoj devas repagi la elspezojn por la ekzekuto.

Ne eblas ĉi tie citi ĉiujn viktimojn de la eksterma kampanjo nek la ĉiam nove inventatajn insidojn kontraŭ la iranaj Bahaanoj. Necesas menciigi, ke la tutmonda Bahaa komunumo preĝas en ĉiu Festo de la Deknaŭa Tago por denove martiriĝinta amiko.

La tuta mondo protestas

Kvankam la gazetaro ne multe raportas pri la martiriĝo de la iranaj Bahaanoj - versajne okazas tro da teruraĵoj en nia mondo - almenaŭ la parlamentoj kaj ŝtatestroj tra la tuta mondo estas informitaj. Multaj parlamentoj unuanime akceptis kaj publikigis rezoluciojn favore al la irana Bahaa komunumo kaj postulas la obeon de la fundamentaj homaj rajtoj. Interalie temas pri rezolucioj de

- Kanada Parlamento
- Eŭropa Parlamento
- Komisiono pri homaj rajtoj de UN (subkomisiono de UN-ECOSOC; pluraj rezolucioj)
- Eŭropa Konsilio (Council of Europe, Europarat)
- Aŭstralia Parlamento (ambaŭ ĉambroj)
- Brita Parlamento (House of Lords)
- Germana Parlamento (Bundestag)
- Parlamentoj de Alasko kaj Illinois (Usono)

Krom tio multaj ŝtatestroj elpaŝis publike por subteni la Bahaanojn de Irano.

Interalie estis

- Ministro pri eksteraj aferoj de FRG, Genscher
- Oficejo de la brita ĉefministro
- Prezidento de Francujo, Mitterand
- Oficejo de la reĝo de Belgujo
- Prezidento kaj kulturministro de Luksemburgo
- Ĉefministro de Hindujo, Indira Gandhi
- La registaro de Okcidenta Samoa

Ankaŭ pluraj kristanaj kaj judaj unuiĝoj laŭtigis sian proteston. Antaŭ tiuj protestoj la irana registaro kaj ĝiaj ambasadoj ne povis silenti. Laŭ ili ĉio estas en bona ordo, la leĝoj estas tiaj, kiel la Korano preskribas, kaj oni obeas nur la sanktan devon.

H.D. Maas

POŝTMARKOJ

La kolektado de poŝtmarkoj en 1982 donis al Horizonte la sumon 1300 kr. Tio signifas, ke ni povos senpage abonigi dek tri esperantistojn en nepagipovaj landoj. Tiel uzante la monon ni ŝparas la impostelspezojn. Se iuj el niaj legantoj deziras tiel abonigi gekorespondanton en unu el tiaj landoj, bonvolu sendi al ni nomon kaj adreson de la persono, kiun vi deziras abonigi.

Ni dankas al ĉiuj kontribuintoj, precipe al la plej grandaj: Oomoto, Japanio - S-ro Vadrine, Francio - S-ro Bertram Potts, Novzelando - F-ino Sirkku Koivu, Finnlando - S-ro X, Ĉeĥoslovakio.

En 1982 kreskis la sumo de 1000 kr. ĝis 1300 kr. Kun danko ni akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn ankaŭ en la nova jaro.

Feliĉan Novjaron deziras al vi
Eldonejo Perspektivo

RESPONDECO DE REDAKTOROJ

Tiu ĉi rubriko sporade atentigas pri unuopaj gramatikaj, terminologiaj kaj aliaj eraroj, ripete renkontataj en niaj publikaĵoj. La legantoj eble ricevas la impreson, ke temas nur pri kelkaj lingvaj eraroj kiuj, kvankam ĝenaj, ne prezentas ian seriozan danĝeron por la lingva unueco. Bedaŭrinde ne estas tiel. La kvanto da ĉiaspecaj eraroj, precipe en la Esperanto-periodaĵoj, fariĝis tiel granda en la lastaj jaroj, ke eĉ bonaj konantoj de la lingvo - por ne paroli pri la novuloj - ofte konfuziĝas kaj aŭ tute ne komprenas iujn tekstojn, aŭ miskomprenas ilin. Mi mem kelkfoje demandas min, ĉu la aŭtoro efektive deziris diri kion li diris, aŭ li celis ion alian.

Sur mia skribotablo troviĝas deko da gazetoj kaj revuoj, kiujn mi trafolumis, parte ankaŭ tra legis, en la lastaj tagoj. En du el la organoj de landaj Esperanto-organizaĵoj mi trovis preskaŭ en ĉiu linio 1-2 elementajn erarojn. Kelkloke en unusola vorto estis 2-3 eraroj, ekz. "censuratan" anst. "cenzurita"; "la kongreso estis okaziĝita" anst. "okazis", ktp. Eĉ periodaĵoj ĝenerale bonaj el lingva vidpunkto ne estas imunaj. Jen nur kelkaj el la multaj eraroj rimarkitaj en periodaĵoj kun vasta internacia legantaro:

"Nukleara" anst. "nuklea"; "UNO penas verki traktaĵon" anst. "UN" kaj "trakta-ton"; "planko de oceanoj" anst. "fundo" ktp. En alia prestiĝa revuo sur nuraj 2 paĝoj estis trideko da eraroj, inter kiuj: "alportata kun la veturiloj" anst. "per"; "estis konkludata" anst. "konkludite"; "la soldatoj estimis la ordonon" anst. "obeis" aŭ "observis"; "unu de ili" anst. "el"; "sinvestiĝis" anst. "sin vestis"; "stariĝis sin" anst. "ekstaris"; "malfermiĝitaj okuloj" anst. "malfermitaj", ktp. En magazino tre populara: "li alvenis ĉi tie, en la mara urbo" anst. "ĉi tien, en la maran urbon"; "sur la pordo estis skribita" anst. "skribite"; "ĉesitan" anst. "ĉesintan" aŭ "ĉesigitan"; "invitas min en vasta ĉambro" anst. "en vastan ĉambron", ktp. En alia periodaĵo oni sciiĝas, ke iu eldonejo "publikiĝis" anst. "publikigis", kaj ke unu el la broŝuroj enhavas biografion de fama scienculo kaj prezentas liajn atingojn "en scienca kampo" anst. "sur". La "en" daŭre aperas, pli fatale, en formo "skribas en gazeto" anst. "estas skribite". Kompense, en organo de najbara landa asocio la legantoj ĉiam legas "sur gazeto" (starante aŭ sidante sur ĝi?) anst. "en" gazeto. Laŭ alia organo de landa asocio, oni en la koncerna organizaĵo "disputas" anst. "diskutas", dum en geografie kaj ideologie najbara lando la kongresa rezolucio "esprimis absolutorion(?) al la komitato" anst. "liberigis" aŭ "senŝarĝigis la komitaton". (Parenteze: eble oni

povus diri, ke la kongreso, almenaŭ enpense, absolvis la pekojn de tiu konkreta komitato, sed tion, evidente, la verkintoj de la rezolucio ne intencis diri).

Laŭ iu aŭtoro, "la pordegoj estis fermitaj" anst. "estis fermitaj", kaj li "malstreĉis" anst. "malstreĉiĝis", dum la "virino akceligis la aŭton" anst. "akcelis", ktp. Artikolo, enhave tre bona, informas, ke en iu lando ŝtatperfido, sabotado, murdo, rabo, ŝtelo k.a. estas "ofendoj" anst. "krimoj". Ktp., ktp. Tutan numeron de *Horizonto* oni povus plenigi per eraroj trovitaj en tiu deko da periodaĵoj. La aliaj - kun 4-5 esceptoj - ne estas lingve pli bonaj.

Pri tiu maltrankviliga stato respondecas ne nur la aŭtoroj de artikoloj kaj de aliaj tekstoj, sed ankaŭ - kaj unuavice - la redaktoroj. La *Esperanto*-periodaĵoj devus esti lingve tiel bonaj, ke legante ilin ĉiu bona konanto de la lingvo ne-konscie daŭre vastigadus sian scion, dum por la novuloj ili estus siaspeca konstanta kurso por progresintoj.

Por atingi tion, la aŭtoroj devus klopodi liveradi al la redakcioj lingve sen-riproĉajn tekstojn, sen unusola gramatika eraro kaj sen naciismoj (idiotismoj). Ĉar granda parto de la eraroj ŝuldiĝas al influoj de la respektivaj naciaj lingvoj, en ĉiuj iom dubaj kazoj la aŭtoroj devus konsulti bonajn vortarojn kaj gramatikojn. *PIV* kaj *Plena Analiza Gramatiko* devus esti ofte konsultataj, kio ne signifas, ke oni devus senkritike akcepti ĉion en la du verkegoj.

Aliflanke, la redaktoroj estas finfine respondecaj ne nur pri la enhavo, sed ankaŭ pri la lingvo. Estas ilia rajto kaj devo korekti ĉiujn lingvajn erarojn en la publikigotaj tekstoj. Bedaŭrinde, tro ofte la redaktoroj aŭ ne havas tempon por korekti la amason da eraroj aŭ mem ne scias kontentige la lingvon. Se tiel, ili havu kompetenta(j)n lingva(j)n revizianto(j)n. Laŭ mia scio nur unu el la landaj organoj havas tian revizianton. Verŝajne tial en ĝi preskaŭ forestas eĉ eraretoj.

Renkonte al la Jubilea Jaro unu el la taskoj interne de la *Esperanto*-Movado estu konsiderinda altigo de la lingva nivelo ĝenerale, precipe en niaj publikaĵoj. En tiu ĉi kunteksto, senkonsidere al la enhavo, ili ĉesu esti "mallernejoj" kaj fariĝu veraj lernejoj de la Internacia Lingvo kaj fortikigantoj de ĝia unueco.

I.L.

"... Kiam ni mem volas scii, ĉu nia afero progresas aŭ ne, ni devas esplori la faktojn internajn."

L.L. Zamenhof

Tra la Esperanto-Gazetaro

Redaktas JEAN THIERRY

5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

En *Semajna Bulteno* n-ro 238 (13/9/82) Daniel Luez aperigis du interesajn artikolojn: unu pri la profesiaj pagoj de la telefonlibro en Francio, en kiuj pagoj kreiĝis la rubriko "Esperanto-instruantoj" (tiel povas publikiĝi nomo, adreso kaj telefonnumero de ĉiu, kiu instruas la lingvon); alian pri kritiko de la dokumentoj ricevitaj en la Antverpena U.K., el kiuj unu sub la rubriko "kiel amuziĝi" temis pri "seksumado!" Efektive, ĉu "oportuna tiu instigo al diboĉo?... *"Ankaŭ scenoj en la teatraĵo "Ĉu vi jam vidis la piedsignojn de l'profeto?" estis maldecaj, kaj ĉar oni tute ne avertis pri tio, eble eĉ infanoj akompanantaj siajn gepatrojn vidis kaj aŭdis tion!"*

Sed en *Semajna Bulteno* n-ro 240 (28/9/82) precipe sur la pagoj dediĉitaj al *Mundo* n-ro 184 denove artikolo provas detrui la konjugacion de Esperanto: Oskar Svantesson proponas tiucele enkonduki la neologisman verbon "vardi" de la docento Ebbe Vilborg!

Speciala numero de vest**FALIAJ** flug**FOLIOJ** eldonita de Rikardo Ŝulco samcele provas pravigi la AT-sistemon "por bone kompreni la Zamenhofan temposistemon". Ankorau unu provo, kiu ne liberigis sin de sia kvazaŭ denaska nacilingva pensstrukturo! Kaj en la numero 35 de la sama flug**FOLIO** kvarpaĝa kritiko temas pri la § 113 en "PLENA ANALIZA GRAMATIKO" (pasiva voĉo): erare humanum est, perseverare diabolicum! Kiom da tempo kaj inko senĉese perdataj pro la AT-obstino! Ja en la numero 37 sama ekzerco ekbrilas, sed ĉi-foje pri la § 114 en "PLENA ANALIZA GRAMATIKO" (pasiva voĉo)!

En vintro 1981 aperis la unua numero de PLANLINGVISTIKO sub la numero 0 sed kun inaŭguraj salutoj de Tazio Carlevaro kaj Gaston Waringhien. Krom la maloportuna nomo de planlingvistiko venas jam en la unua numero de printempo 1982 pretekstoj por prezenti la IDO-lingvon; kaj en la dua numero de somero, ia lingva distraĵo de K. Kalocsay, kaj tuta komentario pri studenta kanto en volapuko... Jen kio sendube progresigos Esperanton!

Feliĉe la numeroj de LITERATURA FOIRO estis en 1982 aparte valoraj: la numero 71 koncernis la ĝeneralizaĵojn de la TRADUKARTO, la numero 72 pli speciale la KANTO-TRADUKADON, kaj la numero 73 la TEATROLINGVON. Krome en numero 72 elstaras trafa recenzo de Michel Duc Goninaz pri la libro de Olav Reiersøl "Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto".

Alia flugfolio flugis en somero sub la nomo ENSPEZANTO, ia parodio de la revua jaketo de ESPERANTO. Bedaŭrinde la flugfolio flugas ja tre malalte: ekzemple, *universa esperanto-ambicio (kun stultaj rilatoj al Unesko) - Feke - ESPERANTO LAŬ LA LATRINA METODO...* Senkomente!

En la numero 425 de NOVZELANDA ESPERANTISTO (4-1982) Bernard Golden alpinglas kelke da eraroj pri verba transitiveco en Esperanto, kiun li rigardas grava problemo. La sama numero salutas la kunvenon en Münster, kiel unuan amikan renkontiĝon inter funkciuloj de UEA kaj Prof. D-ro Ivo Lapenna depost la "Hamburga Puĉo" kaj esperas, ke tio heroldos epokon de kunlaborado. Ankaŭ pri tio aludas AŬSTRIA ESPERANTO-REVUO (1982/7-9)! Des pli utilas substreki tion, ke ne multaj tion faris... Eĉ kelkaj kiel HEROLDO ne hezitas deziri la malon! Tiel plu senmaskiĝas la dekomenca subfosa agado de la redakcio de HEROLDO!

El SENNACIECA REVUO (n-ro 110) elstaras tre interesaj konsideroj de prof. P. Janton: *Espero por Esperanto*, eĉ se la finaj konkludoj meritas esti konsiderataj kun singardeco: "La Esperanto-agado ne estas apartigebla de ĝenerala lingvo-politiko, kaj lingvo-politiko ne estas apartigebla de politiko." Ja tio tro ofte alkondukas al iu partipolitikeco, dum la demando restas: ĉu la esperantistoj mem ne kapablas enŝovi en la mondon propran politikon?

La kunlaborado de SAT kun MEM levas fortan kritikon de membro de SAT en SENNACIULO (julio 1982): "Do, SAT kaj MEM kunlaboros... Tio signifas, ke SAT ne plu estas "reakcia asocio", laŭ ne longtempa vidpunkto de MEM? Ambaŭ asocioj "batalos kubuto ĉe kubuto" por Paco! Por kia Paco? La Paco soveta, kompreneble!... Ĉu en Sovetio kaj en la satelitaj landoj oni povas facile aboni Sennaciulon? Ĉu ekzistas SAT-rondoj? Tie kuŝas la demandoj! Por mi SAT ne povas kunlabori kun tiu subtenanto de l'ruĝa faŝismo, kun la lando de la gulagoj, aŭ SAT NE PLU ESTAS LA PORSOCIALISTA ASOCIO, KIUN MI ŜATIS. Se jes, mi ne plu povas resti en ĝi. (R.J. MARTIN)." Jen deklaro sufiĉe klara per si mem! Male la nepartopreno de SAT en kunvenoj pri organizotaj komunaj aranĝoj en la jubilea jaro 1987 ankaŭ provokas kritikon: Kiam SAT jam de komenco sin retiras de kunagado por 1987, ĉar "la P.K. jam nun antaŭvidas problemojn", tiam oni uzos tion poste kontraŭ nia Asocio kaj konsideros niajn membrojn kiel 'ĉiamajn kontraŭulojn'. Kaj ĉu la plimulto de la SAT-membroj tion deziras? Mi restas scivolema, kion niaj membroj per referendumo decidus! (G. van der Horst). En la sama numero aperas recenzo de prof. Ivo Lapenna pri "Moderna Kroatia Prozo" tradukita de Roger Imbert: "La longeco mem de tiu ĉi recenzo montras, kian pozitivan signifon mi atribuas al tiu ĉi valora verko malgraŭ la supraj kritikaj rimarkoj. Ĝi ebligas pli bone konatiĝi kun la literaturo de malgranda popolo kaj kun la sociaj rilatoj, kiujn ĝi arte spegulas. Ĝi sendube estas plia elstara kontribuo al la traduka literaturo en la Internacia Lingvo." Kaj la kunlaborado de SAT kun MEM kaj la nepartopreno de SAT en kunveno pri 1987 eĉis en la debatoj de la 55-a Kongreso de SAT publikigitaj de SENNACIULO (oktobro 1982): K-do Chevrolat legas leteron de kamarado Grandière, kiu opinias, ke ni devas interrompi la kontrakton pri la kunlaboro kun MEM... La ĝenerala sekretario de MEM senkondiĉe subtenas la pacon laŭ soveta saŭco. Ni SATanoj ne povas akcepti tian agadon. Pro la ligiteco de MEM al la teorioj pli politikecaj ol pacistaj, k-do Grandière proponas la rompon de la kontrakto inter SAT kaj MEM. Ankaŭ pluraj kamaradoj reagis pro tiu kontrakto, ĉar MEM ĉiam subtenas la sovettian "pacon" kaj ne ĝeneralan". - K-do Zlatnar: Kiam mi aŭdis la leteron al UEA responde al tiu invito (pri komuna kunveno por la festo de 1987), mi estis surprizita, ĉar la respondo, kiel vi aŭdis, estas nea (nome) ke SAT ne volas esti ligita al tiu festo. Mi treege miras, kiamaniere la P.K. povis entute tion fari..."

J. T.

26

Retoriko de Prof. D-ro Ivo Lapenna estas tradukita en la ĉefan lingvon, sed la libro ankoraŭ ne aperis.

"Jura Terminologio en Esperanto: Problemoj kaj Solvoj" estas la temo de 5-taga seminario, kiun organizas Kultura Centro Esperantista (KCE) en la kadro de la konata Internacia Altlernejo en La Chaux-de-Fonds dum Pasko 1983. Prezidos S-ro Claude Gacond, Direktoro de KCE, prelegos Prof. D-ro Ivo Lapenna (Universitato de Londono). Detaloj pri la programo aperos en la sekvanta n-ro de *Horizonto*. Informojn pri aliĝo, kotizoj kaj loĝado donas KCE, Postiers 27, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

La 56-a Kongreso de S.A.T. okazos en Linz, Aŭstrio, de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1983, do en la semajno antaŭ la 9-a Internacia Konferenco de N.E.M. en Graz. Informojn donas S.A.T., 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris, Francio.

La 17-a Konferenco de I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) okazos en Sintra, Portugalio, de la 14-a ĝis la 22-a de julio 1983. Informojn donas Inĝ. A. Franco Simões, rua Dr. João Couto 6 r/c A, 1500 Lisbono, Portugalio.

D-ro Victor Sadler, multjara oficisto de UEA en diversaj funkcioj, laste en tiu de Ĝenerala Direktoro (titolo enkondukita post Hamburgo), forlasas sian laboron en UEA. Laŭ fidinda informo, tio okazos la 31-an de decembro 1982, sed nenio tiurilate estas notita en la oficiala organo de la Asocio.

Ĉ. 1000 kolektivajn abonojn perdis la oficiala organo de UEA *Esperanto* en 1983, ĉar, laŭ fidinda informo, GEA decidis ĉesigi la koncernan kontrakton kun UEA. Tiuj "kolektivaj abonoj" estis enkondukitaj post Hamburgo por iel anstataŭigi kelkajn malaperintajn organojn de landaj asocioj. Nun GEA havas sian organon *Esperanto* aktueli, kiun la administracio/redakcio de *Horizonto* regule ricevadas interŝanĝe.

Kunveno de 17 membroj de la Akademio de Esperanto okazis dum la UK en Antverpeno. Pro la neĉeesto de la sekretario, Akademiano D-ro W. Bormann protokolis kaj tuj post la kunveno sendis la tekston al S-ro W. Auld, funkcia kiel prezidanto, por multobligo kaj distribuo, sed la membroj ĝis nun ricevis nenion. Ankaŭ la jam delonge promesitaj elektoj ne okazis. La kompleta silento de la Akademio sub S-ro W. Auld maltrankviligas kreskantan nombron da personoj en la Akademio kaj ekster ĝi.

La Jarlibro de UEA por 1982 aperis fine de novembro de tiu jaro. Antaŭ 1974 la *Jarlibro* dum multaj jaroj regule aperadis en du partoj: la unua komence de la jaro, la dua post la UK. Ĉiu el ili havis ĉ. 350 paĝojn aŭ pli.

D-ro André Albault transdonis al la eldonejo STAFETO la manuskripton de sia verko "Vojaĝo tra la landoj". La verko pristudas la moviĝon de la ideoj pri tiu temo, la geografiaj landnomoj, de 1887 ĝis nun. Ekzistas solvoj por fine eliri el la nuna haoso.

Kroatia Esperanto-Ligo estas subtenata de La Komisiono por Edukado, Scienco kaj Kulturo de la Sindikat-asocio de Kroatio. La Komisiono proponis al Radničke novine (laborista gazeto), Školske novine (lerneja gazeto) kaj al aliaj gazetoj enkonduki konstantan rubrikon por priesperanta aktiveco. (Laŭ *Sennaciulo*).

La jam tradicia Trilanda Konferenco okazis pasintan septembron en la urbeto Pöckau, Aŭstrio. Partoprenis ĉ. 100 esperantistoj el Aŭstrio, Italio kaj Jugoslavio. Laŭ la jugoslavia *Voĉo*, plene sukcesis la fervojista sekcio de la Konferenco, dum en la pedagogia konferencis nur la jugoslaviaj pedagogoj kaj en la junulara mankis jugoslaviaj gejunuloj. La sekvanta, 15-a laŭvice, Trilanda Konferenco okazos en Italio.

En Pakistano tre sindone laboras por Esperanto S-ro Saeed Farani, 24-jara esperantisto, apoganto de N.E.M. Por sia laboro li bezonas lernilojn, librojn, revuojn, gazetojn kaj aliajn esperantaĵojn. Helpu lin per via sendaĵo al adreso: Pakistana Esperanto-Asocio, p.a. Saeed Farani, Esperanto-Domo, No. K-118, M.M. No. 3, City Jhelum, Pakistano.

La bahaanoj tre dankis pro la artikolo de s-ro Heinz Dieter Maas. Bedaŭrinde neniu kaj nenio povas influi al la reĝimo de Kohmeniy. Ĝus venis informoj pri kvar novaj kazoj de murdado.

Nia franca-dana skulptisto-pentristo, Pierre Gaborit, kiu kunrespondekas pri la arta aspekto de *Horizonto*, ekspoziciis komence de oktobro kelkajn el siaj pentraĵoj kaj diversspecaj grafikajoj en la bela, moderna biblioteko de Birkerød (antaŭurbo de Kopenhago).

La ekspozicio estis aranĝita de la urbo okaze de la 10-jara jubileo de la dana aliĝo al la Europa Komunaro. Pro la "bona kvalito" de tiu ekspozicio la urbo plilongigis ĝin ĝis la 22-a de oktobro. La foto montras parteton de la belega vico de liaj kupraj gravuraĵoj.



9-a INTERNACIA KONFERENCO (daŭrigo desur p.17)

Kiel jam menciite en la antaŭa numero de *Horizonto*, la bankedo okazos en restoracio sur la kastelmonto. Ĝi estas atingebla per kablofervojo, sed oni povas ankaŭ "surgrimpi" la monton laŭ ĉarmaj vojetoj aŭ ŝtuparoj tra arbareto aŭ floranĝoj.

Sed nun ankoraŭ pri la Konferenco mem: Kiel vi jam scias, laŭ la decido de Vilafreanca la ĉefa temo estos: *Survoje al la 100-jara datreveno de ESPERANTO: Progreso de la preparlaboroj*.

Prof. D-ro Ivo Lapenna jam konsentis, fari la festparoladon en la solena inaŭguro.

Pluraj debatoj kaj kunsidoj pritraktos la ĉeftemon. Krome okazos la ĉefkunveno de ICNEM, kaj ankaŭ la Plenuma Komitato de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj jam decidis, okazigi la jaran ĉefkunvenon en la kadro de la Konferenco en Graz.

Do, la plej multajn erojn de la provizora programo, prezentita en la aliĝilo, ni jam povas konsideri kiel definitivajn. Ankoraŭ ne estas certa la preciza tago, en kiu okazos la akcepto ĉe la landestro, ĉar tion oni povas nur fiksi en printempo.

En la sekvantaj numeroj de *Horizonto* ni ree raportos pri la stato de la preparaj laboroj por la Konferenco. Intertempe ni ankoraŭfoje invitas vin je multnombra partopreno.

Klaus Perko

LA REDAKCIO RESPONDECAS PRI LA ĜENERALA LINIO DE HORIZONTO. SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ NE NECESE REFLEKTAS LA STARPUNKTON DE LA REDAKCIO AŬ DE I.C.N.E.M.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Korespondada adreso: Kiu ajn el la funkciuloj de la Centro (v. sube).

FONDO KAJ CELOJ

Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de la Centro kaj al la *Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado*.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havos nur limigitan nombron da ordinarnaj membroj.

MEMBRECO

Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu parolas la Internacian Lingvon kaj ĉiu Esperanto-organizaĵo, kiu agas konforme al art. 2 de la *Statuto*. Krome fizikaj kaj juraj personoj povas esti akceptitaj kiel neordinarnaj membroj. Informoj pri membrokategorioj kaj iliaj kontribuoj kaj kotizoj troviĝas en la sube menciitaj broŝuro kaj aliĝilo.

PLENUMA KOMITATO

Prezidanto Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA 9 8TF, Middlesex, Britio.

Vicprezidantoj D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

Sekretario F-ino MARIANNE VERMAAS, Nieuwe Binnenweg 70, I.R. 3015 BC
Rotterdam, Nederlando.

Kasisto S-ro cand.merc. KAJ RØSSUM, Hulkærvej 31, DK-2860
Søborg, Danio.

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de la Centro ricevadas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la *Eldonejo Perspektivo*, estas ankaŭ *aparte abonebla* rekte ĉe la eldonejo aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.

ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bonvolu havigi ĉe la sekretario-kasisto. Li akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (poŝtĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bonvolu atenti: Se por iu deziranta aliĝi estas pli facile pagi al la prezidanto aŭ al unu el la vicprezidantoj, li/ŝi povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo de la Centro ordigos tion kun la sekretario-kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

*Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo.*



Ĉiuj verkitaj en **modela Esperanto**.

El la verkaro de Ivo Lapenna en la kroata, la franca, la angla kaj la Internacia Lingvo kaj japana traduko de Retoriko

RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvendita: 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 8 anglaj pundoj, 80 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita nur 6 anglaj pundoj aŭ 60 danaj kronoj (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de *Retoriko*, 152 p., fortike broŝurita prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularsciencia kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 3 anglaj pundoj, 30 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplete sen *Hamburgo en Retrospektivo*, bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, lukse broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj, 18 germanaj markoj, 40 fr.fr., 650 pesetoj aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de junio 1979. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia **LIBROSERVO de NEM**, Nørregårdsvej 91, DK - 2610 Rødovre, Danlando. Kun escepto de *Esperanto en Perspektivo*, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la *aŭtoro*: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de *Hamburgo en Retrospektivo* estas mendeblaj ĉe s-ro *Jean Thierry*, 5, rue Léon Cogniet, F - 75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe **ELDONEJO PERSPEKTIVO**, Nørregårdsvej 91, DK - 2610 Rødovre, Danlando, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidara funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en *HORIZONTO*, ili estas la plej trafa respondo al la pseudosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la *zamenbofa esperantismo*

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO,
Nørregårdsvej 91, DK - 2610 Rødovre, Danlando.